Sekve de tio, Alfredo Villa sin ekskludis el tiu-ĉi E-grupo. Tamen li daŭre kaj dum la cetero de sia vivo kunlaboris kun la esperantistoj de Gijón, kaj ĉi tiuj ĉiam proponis lin por la estraro de HEF.

La 6an de septembro la E-grupo havis sian unuan oficialan kunsidon, kiun prezidis Alberto Menéndez. Oni elektis la estraron:

Prezidanto: Alberto Menéndez Menéndez .
Sekretario: José Ordieres Dacosta.
Unua voĉdonanto: Luis Serrano Pérez.

La unuaj disponoj de tiu komitato estis la organizado de ekspozicio pri Esperanto kaj la intervidiĝo kun la samideanoj de Oviedo.

En la Asturia ĉefurbo ekzistis tiam iu E-rondo nomata Esperanta Klubo “Nordo” enkadrigita en la oficiala (de la reĝimo) klubo-reto nomata “Edukado kaj Ripozo”, kaj gvidata de Luis García y Eloy Noriega. Ne eblas al ni scii ĉu tiuj samideanoj esperantiĝis antaŭ la milito, kiam ekzistis en Oviedo vigla E-grupo. Pli verŝajne ili eniris en la esperantistan mondon kadre aŭ subinflue de la Kongreso okazinta la jaron 1955 en Gijón. Ĉiukaze, notindas ke de tiam kaj dum kelkaj jaroj tiu E-grupo de Oviedo regule kunlaboradis kun tiuj de Gijón kaj El Entrego.

La unua kunlaboro de tiuj grupoj estis por la organizado de la menciita Ekspozicio de Esperanto en Gijón. Temis pri prezentado de esperantaĵoj: ĵurnaloj, poŝtkartoj, afiŝoj… el fremdaj landoj. Per tiuj ekspozicioj niaj samideanoj celis montri al la publiko ke pere de la Internacia Lingvo Esperanto eblas interrilati kun fremdaj personoj kiuj havas malsamajn gepatrajn lingvojn. Por la organizado de la ekspozicio multe devis labori niaj samideanoj. Ili petis materialojn al landaj kaj fremdaj Esperanto-organizaĵoj, al ambasadejoj kaj ĉiutipaj institucioj en- kaj eksterlandaj. La ekspozicio estis inaŭgurita la 4an de decembro de la jaro 1958, kaj dum kelkaj tagoj vizitis ĝin inter 8 kaj 10 mil personoj, inter ili kelkaj aŭtoritatoj kaj elstaruloj de la urbo.

Dum la okazado de la ekspozicio oni anoncis la baldaŭan komenciĝon de kurso de Esperanto. Estas trafa atesto de la sukceso de la ekspozicio la fakto ke por la kurso enskribiĝis 80 personoj: 50 viroj kaj 30 virinoj. La kurso komenciĝis la 9an de decembro kaj okazis en la Ateneo subgvide de Alberto Menéndez. Dum la unuaj semajnoj la nombro da gelernantoj malpliiĝis al 55 aŭ 60. Poste tiu nombro plialtiĝis sed post la Kristnaska ferieto, kiel kutime, malpliĝis denove, restante nur 40 gelernantoj. La kurso finiĝis la 7an de marto kun 30 novaj samideanoj; oni konservas iun foton faritan tiutage al la kursanoj kiun ni prezentas en la sekva paĝo. Alberto Menéndez aperas en ĝi en la dua vico, apud angulo de la portreto de Zamenhof. Plejparto el la personoj kiuj aperas en tiu foto estis novaj gelernantoj, sed estis ankaŭ aliaj kiuj estis aktivaj esperantistoj de antaŭ iom da tempo, kiel Juan Fernández, en la supra vico, maldekstre en la foto, aparteninta al la E-grupo iam gvidita de Alfredo Villa en la Laborista Ateneo. En la dua vico, dekstre en la foto, sidas samideano Ordieres, tiama sekretario de la E-grupo, kaj malantaŭ li, staras Luis Serrano. La ino sidanta en la dua vico, maldekstre en la foto, nomiĝis Carmen Argüelles; ŝi aktive partoprenis poste dum multe da tempo en la laboroj de la E-grupo ĝis ŝia translokiĝo al alia urbo. Estas konstatinda ekde tiu epoko la partopreno de virinoj tiel en la E-movado de nia urbo.

ESPERANTISTA GRUPO
"JOVELLANOS"
ATENEO JOVELLANOS - GIJON (HISPANUJO)

Kun optimismo la E-grupo de Gijón faris projektojn por estonta agado, iuj el ili ne realigeblaj tiam, kiel la organizado de landa kongreso de Esperanto por la jaro 1961. Alia projekto estis organizi, kune kun la E-Klubo Nordo de Oviedo, ekspozicion de eksterlanda presaro, kaj novan kurson de Esperanto en Gijón. La kurso komenciĝis la 9an de marto de 1959 kaj daŭris ĝis la 2a de junio. La skribita informo je kiu ni disponas asertas ke tiu kurso estis bonsukcesa en kio rilatas al la nombro da gelernantoj kaj ties fervora lernado, sed ne informas pri la kvanto da lernantoj kaj kiom da ili estis partoprenintaj antaŭan E-kurson, kio estas ofta okazaĵo en nia movado.

Ankaŭ estas ofta kaj normala afero en la esperantista mondo tio ke gelernantoj kiuj faris unu aŭ pli kursojn, poste ne plu interrilatas kun la E-movado. Aliaj restas kiel membroj de E-grupo dum kelke da tempo, aliaj dum la cetero de sia vivo ne aktivante en la movado sed estante nuraj grupanoj. Krome estas aliaj kiuj, ja, fariĝas veraj esperantistoj, aktivuloj, kaj tiel ili restas dum kelkaj jaroj sed poste ĉesas en tiu aktivado kaj restas kiel nuraj membroj de E-rondo, aŭ eĉ tute forlasas la rilaton kun la esperantismo. Fine, estas tiuj kiuj, kontaktinte kun la esperantista movado, aktive partoprenas en ĝi dum la cetero el sia vivo. Nu, el la multaj gelernantoj kiuj partoprenis la du unuajn E-kursojn de la Esperantista Grupo Jovellanos rezultis ĉiutipaj teniĝoj: iuj ne plu interrilatis kun la esperantistaj rondoj. Aliaj restis kiel membroj de la